

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

AÑO VIII

N.º 3 (87)

MARZO, 1956

BABEL

Reproducción del artículo que bajo este título ha publicado recientemente el periódico «Sabadell».

Precedido de una cita bíblica del Génesis, referente a la confusión de lenguas, en la construcción de la Torre de Babel, se publicó hace unos días, en el número 2.009 de este periódico, un artículo menospreciando la labor proselitista de los adeptos de la lengua auxiliar internacional Esperanto, que cuenta ya más de sesenta años de existencia, y en tan largo lapso de tiempo, naturalmente hemos oído ya tantas cosas que difícilmente puede decirsenos algo nuevo y original.

De la atenta lectura del precitado artículo puede deducirse, sin género de duda, que el autor desconoce la verdadera finalidad perseguida por el movimiento esperantista.

Los discípulos de Zamenhof no pretendemos de ninguna manera la implantación de una lengua universal, o sea, volver al estado anterior a Babel, anulando las lenguas habladas en los diversos países. Por una sola razón, y es ésta: que si tal cosa fuera posible, que no lo es evidentemente, lo ocurrido en Babel se repetiría otra vez, y tal lengua universal se disgregaría más o menos rápidamente en dialectos, que harían imposible toda intercomprensión y relación mutuas. Por tanto, tan insensato ideal está muy lejos de nuestras aspiraciones y de nuestros esfuerzos.

Nuestras pretensiones son más sencillas, y se reducen a la conveniencia de adoptar una lengua internacional que facilite las relaciones comerciales y culturales entre personas de distintos países, las cuales disfrutarán, en tal caso, de un instrumento lingüístico sencillo y neutral, evitando el verse obligados a hacer uso de un idioma extranjero, siempre difícil de dominar y causante de un complejo de inferioridad

en el interlocutor que se encuentra forzado a emplear un idioma que no es el propio.

Es de observación común, que en las conferencias internacionales entre hombres de estado de diversos países, aún cuando conozcan la lengua de sus interlocutores, prefieren siempre usar su propio idioma y valerse de intérpretes; y esta actitud, que no es debida a exceso de orgullo nacional, es muy razonable, pues así, se hallan, desde el primer momento, situados en un plano de igualdad y equilibrio.

Tiene toda la razón el articulista, cuando afirma que es arduo el camino para la asimilación de una lengua extranjera, y podríamos añadir aún, que su absoluto dominio sólo se puede conseguir viviendo algunos años en el territorio donde se habla. Como que, si fuera fácil aprender y dominar las lenguas extrañas, no habría ninguna necesidad del Esperanto!

A este idioma, lo califica el articulista despectivamente de «electuario filológico» del cual aconseja a sus lectores no beber, aun cuando, dicho sea de paso, los electuarios no se beben; se comen. Es de toda evidencia que el articulista no ha probado todavía el gusto de este «electuario», porque en caso afirmativo hablaría, sin duda, de él, en otra forma más considerada. Las lenguas naturales no son seres orgánicos vivos, como afirma el articulista; de ninguna manera; son puras creaciones de la mente humana y muchas veces sus elementos no son mas que corrupciones y desviaciones de sus anteriores; y el Esperanto es, de la misma forma, creación humana. La única e importante diferencia es que éste ha sido creado por una sola mente y las demás han sido creaciones colectivas. Precisamente por esto, es mucho más sencilla y lógica en su construcción la lengua auxiliar internacional.

Así como los floricultores, rosalistas, por ejemplo, partiendo de la rosa silvestre, modesta florecilla, utilizando a su merced las leyes de la fecundación, herencia y selección, han creado una inmensa y cada día más original variedad de magníficas rosas, que adornan nuestros jardines en la primavera, y que nos las ofrece espontáneamente la naturaleza, del mismo modo el Dr. Zamenhof valiéndose de las palabras, de las formas de derivación y de la construcción gramatical de los principales idiomas, ha construido un armazón lingüístico que no constituye ningún «monstruo filológico» como pretende dicho articulista, sino, por el contrario, una construcción armoniosa y simple, artísticamente bella y sugestiva.

Siga el Sr. Carreras el bello ejemplo del Papa Pío XII, que a sus ochenta años se decide a aprender el ruso, cosa de ninguna manera incompatible con el estudio del Esperanto, pues son muchos los esperantistas que no han descuidado el estudio del francés, el inglés, el alemán o el italiano, y emprenda el estudio del Esperanto, que entonces podrá hablar con verdadero conocimiento de una cosa que ahora desconoce; y quién sabe, quizá después de esto, cambie su papel de detractor, por el de fervoroso defensor de la lengua auxiliar. ¡En todo caso no sería el primero!

Mariano Solá.

FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Debemos aclarar a nuestros consocios que la tardanza en contestar las cartas y en la aparición de nuestro boletín, se deben a que tanto el secretario como el redactor están excesivamente ocupados, tanto es así que ambos han puesto de manifiesto su decisión de dimitir, pero con objeto de que esta Directiva tenga un margen de tiempo para estudiar su sustitución, han aplazado su dimisión hasta fin de año. Rogamos pues, a todos, que tengan un poco de indulgencia por estos retrasos.

Algunos consocios, al no recibir el boletín, han interpretado que se trataba de una suspensión en los envíos por no haberse puesto al corriente en el pago de sus cuotas. No hemos dejado de enviar nuestro periódico a nadie, ni incluso a aquellos que se encuentran en el citado caso. Pero rogamos a éstos que tengan la amabilidad de enviarnos la anualidad corriente.

La Junta Directiva.

PRI MIKSOMOZO AŬ MUKOMOZO (1)

Jen malsano feliĉe ne kontaĝebla al la homo, sed pri kiu ofte oni demandas al la kuracisto. Tial mi opinias, ke ĝeneralaj sciigoj pri tiel danĝera kaj mortiga epizotio plaĉos al la legantoj de BOLETIN.

Tiun malsanon okazigas malgranda viruso, kiun la italo Sanarelli trovis en la kunikloj en la jaro 1898. Li intencis inokuli virusojn en kobajojn, ratojn kaj simiojn, sed ne sukcesis. Du viroj akceptis, ĉu volonte?, inokulon, kaj nur suferis negravan konjunktiviton. Oni povas diri, do, ke ĝi atakas nur la kuniklojn, sovaĝajn kaj hejmajn, kaj ankaŭ, malgrandskale, la leporojn, sed ne la ceterajn bestojn kaj la homojn. Tiu malsano estas endemia inter la sovaĝaj kunikloj de Brazilo, kie ordinare ĝi okazigas malmultajn mortojn. En 1939 oni transportis malsanulojn en Aŭstralion por kontaĝi la indiĝenajn kuniklojn, kiuj tro proliferaj naskis milionojn kaj milionojn da idoj, kiuj tutdetruis la flaŭron, eĉ arbotrunkojn! La novaj loĝantoj adaptiĝis iom post iom, kaj dum longa periodo la malsano estis kvazaŭ kaŝita, sed en 1950 ĝi propagiĝis tra vasta teritorio, mortigante dekojn kaj dekojn da milionoj da kunikloj kaj leporoj.

En 1952 franca profesoro enkondukis tiun malsanon en Francujon, por ataki la sovaĝajn kuniklojn, manĝantajn la laktukojn kaj aliajn plantojn. Li plensukcesis kaj savis la vegetalojn, sed oni povas diri, ke lia heroaĵo preskaŭ ekstermis la tutan sovaĝan kaj hejman kuniklaron de Francujo. En 1953 sendube elmigranta birdo kunportanta kuniklopulojn propagis la malsanon en Anglujon, kie la epidemio disvastiĝis tiel rapide kaj amplekse kiel en Aŭstralio kaj Francujo. En 1954 aperis la unuaj fokusoj de la epidemio en nordaj provincoj de Hispanujo. Ĝi disvastiĝis rapidege tra la tuta lando kaj minacas detruiri ĉiujn speciojn de kunikloj kaj leporoj.

Tiel mortiga malsano ne atakas la karnivorajn bestojn, manĝantajn la mortintajn kuniklojn. La insektoj, precipe

moskitoj kaj la puloj de la kunikloj okazigas la propagadon de la malsano. Kompreneble la kontaĝo de besto al besto ankaŭ gravas. La insektoj virusportantaj pikas la viktimojn kaj inokulas la virusojn, kiuj jam multobligas ĉe la sama punkto de la inokulo, kaj poste en la regionaj ganglions, kies barajojn transpasas kaj baldaŭ oni povas trovi ilin en la plej diversaj organoj de la atakito. La unua manifestiĝo de la malsano estas ambaŭflanka blefarokonjunktivito (2) kaj palpebra edemo, kaj du tagojn poste abunda kaj densa pusado. Post tio aperas la klasikaj muktoroj subhaŭtaj, precipe ĉe la kapo, kiu leon-aspektas. La mamoj, la anuso kaj la generorganoj treege inflamiĝas kaj ŝvelas, kaj naŭ aŭ dek tagojn de post la inokulo okazas la morto. Oni povas diri, ke la nuntempa epidemio mortigas proksimume 99 % de la atakitoj. La postvivantoj prezentas gravajn kaj malbelajn cikatrojn en la kapo. Ili neniam plu suferos tiun malsanon, ĉar en ilia sangosero restas antikorpoj, defendantaj ilin kontraŭ ebla nova atako; tio estas, la malsano imunigas ilin. Tion ĉi oni faras en laboratorioj, kie la kunikloj estas multvaloraj helpantoj por provoj kaj reagoj pri imunigo, hormonoj ktp.

Dume la kunikla viando plikariĝas kaj estas tiel luksa manĝaĵo kiel la kaviaro. Espereble estas, ke dank' al la granda proliferado de la kunikloj, la postvivantoj baldaŭ multobligos kaj denove grandamase kuros kaj saltos petole tra arbaroj, montoj, kortoj ktp.

E. Tudela.

(1) Malsano tiel nomata ĉar la multenombraj muktoroj suferitaj de la viktimoj karakterizas ĝin.

(2) Inflamo de la palpebroj kaj de la videbla surfaco de la okuloj.

CURSOS DE ESPERANTO
POR CORRESPONDENCIA

Forn, 19 * MOYÁ (Barcelona)

17-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Barcelono, 24 - 29 de Julio, 1956

Adreso de la Organiza Komitato: Str. Teruel 26 - 28, Barcelona (8)

Se pone en conocimiento de los señores congresistas que deseen pagar únicamente la estancia en el hotel de la categoría que elijan, prescindiendo de los demás servicios, que pueden hacerlo, dirigiéndose antes del próximo día 15 de Mayo a VIAJES MARCO, Rambla del Centro 46, Barcelona, indicando la categoría de hotel en que deseen hospedarse y serán debidamente informados.

En caso de desearlo, pueden también previo pago usar uno o varios de los servicios expresados en los epígrafes A, B, C, D, E, F y G del «alígilo», lo cual deberán hacer constar al formular la petición de reserva de hotel.

Se recomienda en cualquier caso la máxima prontitud en formular las peticiones, pues debido a la gran aglomeración de turistas extranjeros que registra Barcelona en las fechas en que se ha de celebrar el Congreso, es sumamente difícil garantizar la reserva de habitaciones.

Desde hace varias semanas, ha quedado constituido el Comité Organizador del XVII Congreso Español de Esperanto.

Tras las decisiones adoptadas por la Unesco en su reciente Conferencia General de Montevideo, recomendando el estudio y difusión del idioma auxiliar inventado por el Doctor Zamenhof, han aumentado en brillantez todas las manifestaciones esperantistas, entre las que cabe destacar los llamados Congresos Universales, a los que la Unesco envía observador oficial, habiéndose celebrado el último de ellos en Bolonia.

Como en las demás facetas de la cultura, tampoco en ésta podía quedar rezagada Barcelona y pese al carácter nacional de este Congreso, se anuncia la visita de numerosos esperantistas de otros países, procedentes del Congeeo Internacional de Esperantistas Católicos que tendrá lugar con antelación en Zaragoza. Este año, pues, España será testigo de cómo el Esperanto salva las barreras lingüísticas y hace posible el diálogo directo entre personas de todos los países, en contraste con el caos de auriculares, intérpretes y demás medios tan deficientes como costosos y que solo la rutina justifica.

Uno de los actos que sin duda darán más realce al próximo XVII Congreso Español de Esperanto en Barcelona, será la representación de la obra teatral «Jorge Dandin», de Molière, vertida al Esperanto por el propio autor del idioma auxiliar, Dr. L. L. Zamenhof.

En ella, el traductor se hace eco de todas las sutilezas del autor con léxico claro, como Zamenhof acostumbra en todas sus obras, tanto originales como traducidas, así en prosa como en verso. Es por ello que, ejecutada la obra por rapsodas de primera clase y con buen Esperanto, creemos que este acontecimiento será un éxito logrado en nuestro XVII Congreso.

Queremos recordar un hermoso rasgo del 1.º Congreso Español de Esperanto, celebrado en Barcelona en el año 1920, a raíz del cual y como consecuencia de la recién terminada guerra mundial, 1914-18, los dirigentes de aquel Congreso, por medio del Sr. Karl Bartel, delegado de U. E. A. (Asociación Universal Esperantista) en Graz, Austria, acudieron a dar refugio en nuestra ciudad a 400 de los niños austriacos que quedaron desamparados. Cristianas familias se hicieron cargo de ellos. Se formó a tal fin un Comité de Honor integrado por las autoridades eclesiásticas, militares y civiles, y un subcomité de trabajo, formado por D. Claudio Planell, Pbro., profesor de Esperanto de la Universidad de Barcelona; D. José Serrat, Vicepresidente del Grupo «Fajro»; D. Francisco Georgues, delegado de U. E. A. y D. José Anglada Prior. La casa naviera Hijos de José Tayá trajo a los niños gratuitamente desde Génova. Fueron distribuidos además en Vich, donde cuidó de su aposentamiento D. Jacinto Comella, entusiasta esperantista. Y en Gerona, donde intervino el Rvdo. Padre J. Casanovas. Otras ciudades ampararon también a algunos de ellos. (1).

EL COMITÉ ORGANIZADOR.

(1) Entre ellas recordamos a Chestre (Valencia), donde los esperantistas, bajo la dirección del entusiasta S-ano Máñez, se hicieron cargo de un numeroso grupo de niños. N. de la R.

JOZEFO ANSELMO CLAVÉ KAJ LIA IDEALISMO

Okaze do la translokigo de lia monumento al Promenejo Generalo Mola (Gracia-Kvartalo), mi profitas la okazon por skribi ion pri tiu bonfaranta poeto-muzikisto. Mi ne pretendas en la hodiaŭna eseo, studon pri lia dolĉa kaj gaja poezio, aŭ recenzojn koncerne lian muzikinspiration, ĉar lia verkaro estas tiel vasta — ĝi konsistas proksimume el 76 poemoj, preskaŭ ĉiuj muzikitaj —, ke estas neeble fari tion per mallonga artikolo. Mi nur rimarkigos lian artisman fervoron kaj precipe lian idealismon.

Ĝuste, li estis la unua hispana muzikisto koniginta en nia lando, konkrete en Barcelono, la Wagneran trilogion. Pri tio oni ne devas forgesi, ke dum la pasintaj famaj Wagner-festivaloj (Aprilo 1955), kies nekomparebla kadro estis ankaŭ nia urbo, oni tributis al Clavé apoteozan omagon antaŭ impona internacia publiko, kiu senlace aplaŭdadis kortuŝe kaj emocie. Vere, la momento estis ne nur solena kaj etosa, sed nepriskribebla.

Kiel kreinto de la ĥoraj popolaj socioj, lia personeco gigantas kaj atingas gravan kaj unikan reliefon. Clavé estis konvinkita pri la decidiga influo de la muziko sur la homa spirito; tial li sin donis fervore al la efektivigo de sia kara idealo: pere de la eŭterpaj ĥoroj, intenci duoblan pedagogian celon, t. e. amuzi kaj samtempe eduki la laboristojn. Kiamaniere li atingis tion? Unue, plialtigante la muzik-kulturon de siaj ĥoranoj, kaj poste, apartigante ilin el la koruptema trinkeja medio. Aliparte, li konstante klopodadis veki ĉe ilia konscio dormantajn sentojn pri la amo kaj universala kunfratiĝo, nobla idealo al kiu li dediciis siajn tutajn energiojn.

Kiel elokventa pruvo de tiu idealo, jen belega strofo elektita el lia poemaro, kies titolo estas *Gratitut* (Dankemo), kiun mi mallerte tradukis:

Cent popolojn
per sola ĥor' ni ligu
kaj himno por la cento
verdlaŭron konkerigu
kun arta sindonemo,
amtribut
kaj dankemo.

Oni povas konstati, ke la citita versaĵo bone spegulas la penson de l' poeto-muzikisto, kaj samtempe multe konkordas kun la interna ideo de nia kara D-ro Zamenhof, klare esprimita en la himno de l' Esperanto-himno *La Espero*:

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rojon familian.

Se en Katalunujo ekzistis ĉiam granda esperanta movado, oni speciale ŝuldas tion al la ĥoraj aktivecoj de Clavé, ĉar li per sia idealismo parte preparadis la terenon, por ke en ĝi rapide kaj forte enradikiĝu la semo de l' internacia lingvo Esperanto.

Li naskiĝis en Barcelono en 1824, en la placo de l' Duko de Medinaceli (angulo strato Ancha) ĉe antikva domo de l' Grafo de Sankta Coloma. Mortis en 1874.

Jaime Arago, Barcelono

ESPERANTO EN INSTITUCIO DE METILERNANTOJ

En Malago ekzistas institucio, sub la nomo Sindikata Institucio «Francisco Franco», por la kultura kaj profesia instruado de metilernantoj. Ĉirkaŭ mil junaj lernantoj, 12-19 jaraĝaj, estas instruataj en tiu institucio. Samideanoj Eleuterio Moreno García kaj Pedro Real Montañez, oficistoj en tiu lernejo, klopodas interesigi la lernantojn pri la internacia lingvo, kaj en la revuo de la lernejo, *Formación*, aperas esperantista paĝo kun novaĵoj pri la movado, plejparte ĉerpitaj de BOLETIN.

La laboro de la lernejo estas admirinda kaj, rilate kio tuŝas nin, inda je sukceso. Ni tion esperas.

VIVO SAMIDEANA

Al Gesamideanoj Manuel Ortigosa, en Zaragozo, la 11-an de pasinta Februaro naskiĝis filo, Pedro Luis Ortigosa Fernández. Li kaj lia patrino fartas bone. Adreso: Ateca 32, Venecia, Zaragoza, Hispanujo.

KOKO KRIAS JAM! — Originala novelaro de Ferenc Szilágyi, kun portreto de la aŭtoro. Kovrilo de John Hartley. Belliteratura eldonserio, 4.^a de STAFETO 1955. J. Régulo, eldonisto. La Laguna (Kanariaj Insuloj) 232 paĝoj, 16 x 22'5 cm. Prezo: 65 pesetoj
Akirebla ĉe Libro-Servo de la Hispana Federacio.

De stadio al stadio, en gaja strebado al glora rekordo, la flagranta torĉo de nia jam populara STAFETO lasas akurate tre helajn reflektajn, kiel konkretajn atestojn de sia triumfa marŝo, tra la vasta kampo de la tutmonda esperantismo. Venis vico, por la kvara starto, al tre belaspekta libro kun plaĉa abunda legaĵo, por kiu la nura nomo de ĝia aŭtoro estas sufiĉa garantio.

Kutime, en ĉiu lingva movado, la poetoj per la vervo de siaj poemoj estas la unuaj literaturaj kurieroj, kvazaŭ fantaziaj heroldoj de idealaj aspiroj kaj arogaj deziroj. Sed, post iliaj flamaj strofoj aŭ lirikaj lamentoj, preskaŭ nur la prozistoj --liberaj de la velura sklaveco de ritmoj kaj rimoj-- masonas pozitive, per vere kompakta materio, la fortikan blokon, kiu tiel fariĝas bastiono de la koncerna literaturo.

Pravigante la antaŭajn asertojn per aroga kokeriko, ĉi tiu bela volumo de D-ro Szilágyi, kun densa teksto de sukoplana bonega prozo, aperas en momento oportuna por konfirmi la prestiĝon, kiun ĝuste nun nia lingvo gajnas, antaŭ la scivolaj rigardoj de la ekstera mondo.

La sonora titolo de la tuta kolekto --ĉar temas pri novelaro-- apartenas al unu aparte elstara rakonto, kun delikata patoso, kie, inter dilemoj kaj kontrastoj, inter duboj kaj hezitoj, ĝermas la etikaj principoj, kiuj nestis en la animo de Henriko Dunant, iama komercisto kaj poste nobla bonfarinto, kies torturita menso, tra ege krudaj scenoj de milito en la pasinta jarcento, pensis pri la ruĝo de la sango kaj pri la kruco de la kompatato, por fari la emblemon kaj signon de tre konata bonfarema organizaĵo: la Ruĝa Kruco!

En lerta kunplekto, ĉiu el la ceteraj noveloj, per la magio de loga rakontado, vibrigos ĝis ekstrema intenseco ĉiujn kordojn de tiu spirita harpo, kiun ĉiu

homo --eĉ plej skeptika!-- portas kaj gardas en sia animo. Certe, tute certe --oni povas pri tio veti!-- neniu leganto ĉe la fino scios diri, ke li ne estis funde kaptita de serio da emocioj plej variaj, kvazaŭ speciale elektitaj por lia propra temperamento, almenaŭ en unu se ne en pluraj periodoj de jen unu jen alia romaneto el tiuj, kiujn, laŭ ampleksa gamo, D-ro Szilágyi prezentas en sia lasta freŝa bukedo, por inciti niajn sentojn kaj altigi niajn pensojn per dolore ŝirantaj affliktoj aŭ per tre amuzaj komikaj efektoj...

Jam en la enkonduka rakonto *La flamsalamandro*, sur polurita fono de majstra priskribo de sovaĝa naturo kaj ordinara vilaĝa medic, la sinsekvaj aventuroj de filozofema besteto, en libera memdispono ĝis komforta kaptiteco kaj fina mizera morto, aperas en intima rilato kaj rekta ligiteco kun homa sorto, daŭre turniĝema: infanaj petolaĵoj, agrabla hejma vivo, abruptaj ŝanĝoj kaj teruraj spasmoj de perfortita knabino, kiam pro milito «la vivo iĝis pli kaj pli grize malpura, kaj laodoro de homŝvito, fumo, benzino kaj malbonkvalita karbo forpelis la lavendan odormemoron de la infanaĝo».

Sub similaj impresoj, dum partizana milito, fluas *La perdita velo*, tiu blanka tuketo, makulita de sango, ĉe poŝo de erare kaj fie pafmortigita junulo, kiam ameme gardante la velon por kara frateto, li revis samtempe pri la promesita frandaĵo de kiso --unua kiso!-- de sia amatino...

Daŭras la beletra parado, sed mildiĝas la konturoj. La animo revenas al paco pere de la simpatio de *Nila*, kvarjara infanino, kies naivaj observoj kaj demandoj estas valora materialo por studiinda temo, eĉ por funda leciono pri psikologio.

La sekreto de la banko, en formo de sprita satiro, kiun oni legas tre plaĉe, laŭ kreskantaj ondoj da ĝuo, estas forta frapo kaj prudenta averto kontraŭ la moderna socia epidemio de tiuj financaj institucioj, kiuj, sub la blufado de bombastaj nomoj kaj logaj reklamoj pri kreditoj aŭ monpruntoj, kaŝas la malpurajn karakterizajn ungegojn de malnovaj procentegistoj.

Tamen, almenaŭ en ĉi tiu novelo --ŝerce kaj ŝerce plej alte morala-- ruza kampulo, per sia vilaĝana flegmo, sukcesas malkovri la *sekret*on de la banko kaj renversi ĝian tutan mekanismon el mensogoj, trompoj kaj intrigoj. Tio estu ja konsolo! Al la sama speco de morala instruo, sed denove laŭ serioza tono, apartenas la sekva peco *Estis bone tiel*, kie honesta ago de juna advokato kaj decida solidareco de tuta komunumo savis, en oportuna aŭkcio, la modestan posedajon de malfeliĉulo.

En la dua parto, sub ĝenerala devizo: *Facila vento*, kolektiĝas pluraj epizodoj aŭ bildoj el la esperantista popolo, ĉiuj kun bongusta enhavo, spicita per gaja humoro aŭ garnita per alta humanismo, tra la briloj kaj rebriloj de tiu ĉarma prozo kaj modela stilo de nia ŝatata aŭtoro, en kiu mirinde harmonias pasiaj impetoj kun serenaj rezonoj, ridigaj vortludoj kun amaraj konsideroj, ĉar D-ro Szilágyi, nuntempa mentoro de nia literaturo, ankaŭ estas sentema homo, kiu, multe spertinte en sia privata vivo, scias pro tio observi, kompreni kaj dedukti, por trafte kaj bele --belege!-- priskribi la agojn kaj reagojn de ceteraj homoj, loĝantaj sur la tero.

Jes, krom la supera kvalito de la riĉa enhavo, estas elstare rimarkinda ĝia pura priskribado, kiu serene fluas en bonega lingvo, simple kaj nature uzata sen ia artifiko, sen ia balasto, eĉ por ĉizi frazojn tiel plastikajn, tiel reliefaĵajn, kiel la jena: «Estis manĝotempo, kaj la tuta urbo estis kvazaŭ granda moviĝanta, maĉanta makzelo». Similaj ekzemploj larĝe abundas kaj rave plezurigas la legadon, kiu iĝas ankoraŭ multe pli facila pro ege singarda apliko de neologismoj kaj *suplementeskaj* vortoj, kio estas vere sekvida vojo.

Okulfrapa dukolora kovrilo, kun arta desegnaĵo, estas digna fasado por la zorga tipografio aranĝo, kies klara preso, preskaŭ sen eraroj, sur tre bona papero, kompletigas la meritojn, kiujn jam per si mem posedas la verko. Varme do mi rekomendas ĝin, ĉar agante tiel mi plenumas nur honestan devon. Sed, aĉetante kaj legante ĉi tiun libron, oni ne nur pravigos mian rekomendon, sed plene oni lernos kaj ĝuos, pruvante cetere sian bonan guston.

LUIS HERNANDEZ

En Valencio, la 3-an de Marto, vespere, nia samideano Luis Hernandez, tradukanto de «Don-Kiĥoto» kaj membro de la Juĝa Komisiono por la Belartaj Konkursoj de U. E. A. faris interesan prelegon pri la supra temo en la salono de grava literatura societo «Amigos de la Poesía».

La preleginto estis prezentata de la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, D-ro Rafael Herrero, kiu per bele improvizitaj vortoj reliefiĝis la fortan literaturan personecon de S-ro L. Hernandez, altvalora aŭtodidakto, kies kulturo, en fantazia ŝprucemo kaj natura artisma tendenco al ĉiuj formoj de beleco, trovas sian plej ĝustan esprimon pere de Esperanto.

Unuavice, la preleginto kantis per verva parolado la majestecon de la parolo, kiu diferencigas la homon de la aliaj estaĵoj. Li prezentis la rolon, kiun ĉiu lingvo ludas, kiel socia faktoro kaj efektiva materialo por kiu ajn literatura kreaĵo. Poste, li pruvis per trafaj argumentoj la bezonon de unu lingvo internacia; li prezentis la sukcesojn de Esperanto, ne nur por praktikaj aferoj, sed ankaŭ por la literaturo, en kies floranta ĝardeno de la poezio tiel brile pompas la esperantistaj trobadoroj.

En la dua parto, intervenis la glernantoj el la kursoj de Esperanto, E-inoj Carmencin Pascual kaj Maria Rosa Rausell kun S-ro Luis Pedro Garrido, kiuj tre bele deklamis elektitajn pecojn el la originala poezio, ekde la klasikaj kaj romantikaj aŭtoroj ĝis tiuj artistoj de verso, kiuj apartenas jam al la nuna tempo. Tial, ke la poeziaĵoj estis paralele prezentataj kun la hispana traduko, ĉiuj povis rimarki plej subtilajn nuancojn, admirante la literaturajn eblecojn de Esperanto.

Post tiel longa prelego, la oratoro estis varme aplaŭdata de la multenombra ĉeestantaro, konsistanta plejparte el klera publiko, kiu kun videbla plaĉo kaj intereso sekvis kaj aŭskultis la agrablan lecionon. En postaj tagoj, ĉiuj urbaj ĵurnaloj raportis tre favore pri la sukceso de nia kara amiko Luis Hernandez sur la tribuno de «Amigos de la Poesía».

J. Juan Forné.

ĜOJO SUPER LIBRO

Letero al la eldoninto de la novelaro de Reto Rossetti «El la maniko»

Mi, amuziganta leganto, sentas min kiel la senpova kuniklo, kiun la desegnistoj bildis sur la kovrilo de la libro: kuniklo ĵongle ŝtopita en malgrandan vazon. Kaj mi apenaŭ palpebrumas, dum la ĵonglisto prestidigitatore tiras el la maniko ĉiam novajn surprizajn kartojn de sia ludo. La vive kaj bonhumore malfermegitaj okuloj de la amuzisto rigardas al ni trans la paletron de la kartaro, por kiu li parade pavas, por en la tujsekva momento kunklaki la manojn, enpoŝigi la kartojn sub la baskon de sia redingoto kaj rideme riverenci antaŭ la spektatoroj: «Estis bagatelo, miaj karaj. Sed ĉu vi jam vidis jenon?» Kaj komenciĝas nova ludo...

Mi bone scias, ke ĉiuj magiaĵoj estas nur lerto de la fingroj, sed ne ĉiu povas starigi sur la podio kaj ripeti la spektaklon kun la sama efekto.

Mi avide ekfoliumis tiun ĉi trian libron de *Stafeto* kaj eklegis la unuan novelon: «Subite Ruk bremsis sian biciklon kaj kriis al Moŝ, kiu jam ekglitis sur la longa deklivo... Moŝ, haltu! Hej Moŝ, hola hej haltu do!... Por kia diablo vi tiel torente toboganas?...»

En mia memoro elvokiĝis la situacio. Rakonto, antaŭ jaroj legita en «Literatura Mondo», profunde estis enpremiĝinta en mian kapon. Epizodeto de du vojkamaradoj, malamikiĝintaj pro neniaĵo kaj same tiel repaciĝintaj... Vere bagatelo, kiel diris la supozata ĵonglisto en mia antaŭparolo. Sed neforgesebla restis la tiama impresio pri la lingvaĵo, viva, plastika kaj parolebla, ke mi tiam asertis: Tiel aspektos la estonta, ĉiutage aplikata lingvo internacia, taŭga ne nur por seka priskribado, sed plene respegalanta la homan internon kaj esprimanta la gamojn de la homaj sentoj.

Al kiu el ni ne okazis, ke la vortoj, kiam ni volis plentrafe kaj suke redoni nian penson, subite ekribelis en la buŝo, ne volante obei, malgraŭ la kono de la tuta *Plena Vortaro* kaj *Plena Gramatiko*: Kvazaŭ ili komencus kreski, la plumba lango ne volis sub ili moviĝi, turniĝi kaj adaptiĝi al la ŝprucado de la pensoj: Anstataŭ ŝaŭmanta fontano rezultis magra flueto, forgutanta en banalan marĉon. Sed ĉe Rossetti la vortoj preskaŭ dancas, gracie kaj elaste streĉas siajn membrojn, kapreole petolas, montrante al ni piruetojn ankoraŭ neniam viditajn, kaj ĉion ĉi tute kun ŝajna natureco kaj memkomprenebleco.

Kaj ĉar la vivanta homo krom sia salona lingvaĵo posedas ankaŭ provizon da esprimoj de indigno, kolero, surprizo, ekĝojo, ni trovas ĉe Rossetti neelĉerpeblan stokon da tiaj vortturnoj. En ĉiu lingvo oni scias, kaj emas, blasfemi: jen suke kiel la sudanoj ĉe la Mediteraneo, jen piece kiel la puritanaj nordanoj. En esperanto oni kutimis sendi la kontraŭparolanton nur «al diablo» aŭ voki sur lin «mil tondrojn». En aliaj lingvoj oni diversmaniere mildigas la tro akrajn esprimojn kaj sendas onin «al la dorna rozo», «en brulantan fornon»... Kiaj mildigaj surogatoj de la blasfemoj ŝutiĝas el la maniko de Rossetti? Estis amuze legi la unuan fojon lian «Al kukolo!» «Al Saharo!»... «Sankta Salamandro!»... Kaj longa serio da interjekcioj alvokaj, instigaj, sentesprimaj, onomatopeaj (la listo sur la fino de la libro ne elĉerpis la tutan provizon, kiu estis en la libro uzita).

Estas nature, ke la vortriĉa plumo de la novelisto ne cedas antaŭ esprimoj, kiuj jam delonge fariĝis akiraĵo de la literatura stilo.

Pri kio la aŭtoro rakontas en la novelserio: Nenie estas solvata granda, komunhoma problemo. Temas pri simplaj okazaĵoj de simplaj civitanoj, iufoje ankaŭ pri tiklaj situacioj de junaj homoj (kiuj eble ruĝigos vangojn de bone edukita legant(in)o), rememoraĵoj pri interesaj renkontiĝoj, ĉio ĉi amuze kaj stilriĉe redonita: temas plue pri lingvaj bonhumoraĵoj, kia estas *La Neologismologio de profesoro Klapelkap* kaj *La Esperanta vortludo*

BARCELONA. Vere impona estis la Honora Vermuto dediĉita al la esperantista poeto S-ano Francisc Vilá, en la Esperanto-grupo «Auroro» de la Kooperativo «La Hormiga Martinense». Riceviĝis multege da salutleteroj kaj paroladis S-anoj Miró, Vilella, Alberich, Anglada, Chaler, Claramunt Montfort kaj Gisbert laŭdante kun estimo kaj entuziasmo la laborkapablan kaj la poetan meriton de la omaĝato. Nia kara samideano Vilá emocie dankis la ĉeestantaron kaj propagandis fervore la utilon kaj neceson de Esperanto. Oni varme lin aplaudis, kaj la ĉeestantoj subskribis belan albumon, indan memorajon por la omaĝato. La tuta publiko staris aŭskultante nian himnon «La Espero». Fine okazis koncerto kun partopreno de meritoplenaj artistoj. Vere memorinda Esperanto-festo!

S-ano Frederic Pujulá dediĉis al S-ano Vilá tre belan poemeton, kiu aperos en la venonta numero de **BOLETIN**.

BILBAO. La Bilbao Esperanto-Klubo okazigos dum venonta Majo la 50-an datrevenon de sia fondiĝo. Tiukaze oni aranĝos diversajn paroladojn, specialan radio-elsendon, diservojn, iuaŭguron kaj benon de nia oficiala standardo kaj esperantan ekspozicion. Eksterlandaj gesamideanoj flue parolantaj esperanton aŭ kun ioma alĉutimiĝo al prelegoj estos bonvenaj kaj eĉ subvenciataj laŭ disponeblaj monrimedoj. Oni petas al la tutmonda samideanaro alsendon de revuoj, leteroj, poŝtkartoj filatele afrankitaj kaj ĉiuspecaj esperantaj por nia ekspozicio. Ĉio estos danke akceptata. Nia loka radio-stacio E. A. J. 28, Radio Bilbao, kiu elsendas per ondo de 264,8 metroj, t. e. 1133 kilocikloj po sekundo, bezonegas la kontrolojn de la tuteŭropa samideanaro kaj ĉiuspecajn sugestojn pri la esperanta radio-elsendo. La elsendoj okazas ĉiudimanĉe, de la 24-a ĝis la 24,45 laŭ mezeŭropa tempo (G. M. T. plus unu horo). Oni povis konstati, ke la stacio estas aŭdebla post la 24-a horo, de pli ol du mil kilometrojn de nia urbo, ĉar oni ricevis diversajn kontrolojn, bedaŭrinde ne en Esperanto, el Norvegujo, Svedujo, Danujo, Nederlando kaj Belgujo. Ni ripetas, ke ni bezonegas ĉiulandajn kontrolojn por daŭrigi, plifirmigi kaj eĉ pliampleksigi la esperantan radio-elsendon. Gesamideanoj en Norda Afriko kaj Italujo estas insiste petataj aŭskulti niajn elsendojn kaj sendi kontrolojn al jena adreso: «Radio Bilbao», Bilbao, Hispanujo.

VALENCIA. En la Medicina Fakultato, D-ro Tudela gvidas Esperanto-kurson por kuracistoj kaj medicin-studentoj.

SABADELL. En la tre grava lernejo loka «Hermanos Maristas», kies direkcio interesiĝis pri la Zamenhofa lingvo okaze de vizito al la Esperanto-ekspozicio, pri kiu **BOLETIN** jam raportis pasintjare, funkcias ekde 3 Marto, kurso por lernantoj 11-13 jaraj, ĉiun sabaton, gvidata de la urba UEA-delegito. Alia lernejo Sabadell-a aŭkaŭ montris interesigon por enkonduko de Esperanto-kurso.

CALLOSA DE SEGURA (Alicante). Post longa foresto, S-ro Francisco Zaragoza, enkondukinto de Esperanto en Callosa en la jaro 1933, revenis al nia urbo kaj dank' al liaj klopodoj Esperanto ĉi tie vekigis el sia letargio. Komenciĝis kurso kaj oni kunvenas ĉiudimanĉe por praktiki la lingvon kaj projekti estontajn planojn. La malnova Esperanto-grupo denove sin reorganizas.

SANTA COLOMA DE GRAMANET (Barcelona). Ĉiudimanĉe okazas Esperanto-kurso gvidata de S-ano Jaime Miró, el Barcelono.

SAMA DE LANGREO (Oviedo). Radio Langreo ŝanĝis siajn elsendojn. Ĝi disradias nun alternajn jaŭdojn je la 12:45 horo.

Todo el mundo debe saber dos idiomas: el de su país y el Esperanto

DIVERSAĴOJ

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 30^a de Aprilo.

Ni ricevis korektajn solvojn de la enigmoj n.^o 31 kaj 32 el jenaj samideanoj: J. Silva, V. Hernández, V. Monsalve, P. Naranjo, M. Fernández, A. Candela, J. Armadans, S. Roca Rodó kaj J. M. Fontcuberta. Nur de la enigmo num. 32 el jenaj samideanoj: R. Albero, R. Manau, A. Madriles kaj A. Escamilla. Atingis 10 poentojn J. Armadans kaj ni sendas al li la premion.

SOLVO DE LA ENIGMO N.^o 31

1.	Ĉaro	Ĉarmo	M
2.	Placo	Palaco	A
3.	Mato	Marto	R
4.	Kaj	Kajo	O
5.	Vakuo	Evakuo	E
6.	Luko	Lukso	S
7.	Sango	Stango	T
8.	Pino	Piano	A
9.	Veni	Sveni	S
10.	Vidi	Gvidi	G
11.	Pra	Pura	U
12.	Lui	Luti	T
13.	Stano	Satano	A
14.	Tuto	Turto	R
15.	Duno	Duono	O

Maro estas gutaro.

SOLVO DE LA ENIGMO N.^o 32


Horizontale: 1 Boli, omaD. 2 Balustradoj. 3 Er, Imiti, La. 4 Abi, Opa, aiK. 5 Tani, Arko. 6 Regimento. 7 Tiri, Soci. 8 Ist, Ktp, Jes. 9 Am, Koran, Fe. 10 Lokomotivaj. 11 Jenoj, otiL.

Vertikale: 1 Beat, Tial. 2 Barbarismoj. 3 OI, inerT, Ke. 4 Lui, Igi, Kon. 5 Ismo, Komo. 6 Tipometro. 7 Orta, Pato. 8 maI, Ans, Nit. 9 Ad, Artoj, Vi. 10 Dolikocefal. 11 Jako, iseJ.

ENIGMO N.^o 35

Krucvorta enigmo, de J. Devis.

Malsupra figuro.



Horizontale: 2 (Inv) Filoj de onklo. 3 Prepozicio montranta la motivon de ago. Labori. 4 (Rad) Grati. 5 Pasia k volupta. Titolo de ĝentileco k respekto. 6 Longa vira vesto. 7 (Rad) Supro de kapo. Fari ion el nenio. 8 Malamegi pro malplaĉegaj ecoj. 9 (Rad) Sankta libro. Ordonita farena laboro. 10 Grandaj ŝtonoj. 11 Numero. Poseda pronomo. 12 Antikva greka monereto.

Vertikale: 2 (Inv) Instruita. 3 (Rad) Fruktu. (Inv) Kreinto de la universo. 4 (Rad) Tuta skeleto. 5 (Inv) Kvinfingraj plandmarsantaj mamuloj. Ĉiuspeca senferdeka ŝipeto. 6 Pli aŭ malpli dika folio farita el paperpasta. 7 (Inv) Artifike k lerte trompi. Prep. signifanta «esceptinte». 8 Ŝirmilo kontraŭ danĝero. 9 (Rad) Granda dika kapuĉhava mantelo. Pinta metala bastoneto kun pli larĝa kapeto. 10 Ĉagrenis iun malplaĉante al li k kontraŭante lian komprenmanieron pri konveneco. 11 (Inv) Numero. Ekkria k demanda adj. 12 Muzika teatraĵo.



LERNU TRADUKANTE

Inter la sendintoj de korektaj tradukoj ni distribuos premiojn, laŭ samaj kondiĉoj kiel por la enigmaĵoj.

Tradukon de la tasko de Januaro ni ricevis el jenaj samideanoj: S. Roca Rodó, J. Blasco, E. Pons, E. E. Yelland, J. Saladrigas, R. Manau, R. Ayala, M. Fernández, V. Monsalve, R. Albero, V. Hernández kaj E. Marin.

Jen unu el la plej korektaj tradukoj:

Dekdu jaraĝa mi ekstudis muzikon. La orgenisto de la katolika preĝejo de nia vilaĝo estis nomata Matias Romano kaj estis maljunuleto tre afabla kaj bona. Li kutimis konduki min kun si al la ĥorejo kaj tie ludi la orgenon por mi. Ĉi tiu orgenisto estis maljunulo maldika, kun blanka hararo, razita, kun vizaĝo tre mallarĝa kaj frunto tre larĝa. Li havis la vizaĝon de saĝulo kaj emis studi la kutimojn de papilioj, abeloj kaj insektoj. Li klarigis al mi multe da aferoj kaj donis al mi en siaj konversacioj la neprajn rudimentojn de la kulturo. Oni diris, ke mi eksterordinare progresis, kaj la instruisto Romano certigis, ke li devos konduki min al la kastelo kaj prezenti min al ĝiaj mastroj. Tiam en la kastelo loĝis la grafino de Francken, kiu estis vidva sinjorino kun du gefiloj. La filo estis en la kortego de Vieno, okupante gravan postenon, kaj mi ne havis la okazon koni lin. La filino estis nomata Leonor, estis tre bona, virino ĉarma kiel neordinare, afabla, instruita, de granda belo kaj simpatio. Ŝi ravis min, de la momento kiam mi ekvidis ŝin; ŝi baldaŭ farigis mia amikino kaj instruis al mi francan lingvon kaj pianludon.

el la paĝo 268

(tiu ĉi lasta: serioza studaĵo amuza sub ŝelo de felietono). Kaj temas eĉ pri provo de detektivrakonto. Nu, mi konfesas, ke la tiuspeca *La Tripieda Teruro* aŭ *La Kaprica kadaŭro*, vekis en mi streĉan intereson, kvankam mi jam antaŭsciis, ke la solviĝo de la impliko estos tute ordinara, kiel en ĉiu romano de tiu genro.

Se mi devus iel ordigi kaj vicigi la novelojn de la libro laŭ ilia kvalito, mi sendube metus sur la unuan lokon *La taglibron de Aleksandro Zoffany*, tragedion de malaplomba, skrupula animo, neaŭdacanta solvi sian am-problemon per kuraĝa kaj aperta paŝo. La rakonto estas plej arte ellaborita. Kaj poste mi hezitus inter la unua epizodo de la du biciklantaj knaboj (Ho, egoisto!) kaj *Francisko la fuŝulo*, pro la lerteco de la stilo. Entute: *El la maniko* estas bona libro, leginda libro, havinda libro! Al kukolo!!—T. Pumpr.

Por nova tasko, ni daŭrigas per alia peco de la sama romano de Pio Baroja, «El árbol de la ciencia»:

La cantidad de estudiantes y la impaciencia que demostraban por entrar en el aula se explicaba fácilmente por ser aquel primer día de curso y del comienzo de la carrera. Ese paso del bachillerato al estudio de Facultad siempre da al estudiante ciertas ilusiones, le hace creerse más hombre, que su vida ha de cambiar. Andrés Hurtado, algo sorprendido de verse entre tanto compañero, miraba atentamente, arrimado a la pared, la puerta de un ángulo del patio por donde tenía que pasar. Los chicos se agrupaban delante de aquella puerta como el público a la entrada de un teatro. Andrés seguía apoyado en la pared, cuando sintió que le agarraban del brazo y le decían: «¡Hola, chico!» Hurtado se volvió y se encontró con su compañero de Instituto, Julio Aracil. Habían sido condiscípulos en San Isidro; pero Andrés hacía tiempo que no veía a Julio. Este había estudiado el último año del bachillerato, según dijo, en provincias.

CONGRESO DE I. K. U. E.

Se crea la categoría especial de «Congresista Simpatizante» con la cuota de veinticinco pesetas

Hemos recibido una nota del Secretario del Comité Organizador del Congreso de I. K. U. E., en Zaragoza, para que hagamos saber que para dicho Congreso se ha creado una categoría especial de «congresista simpatizante», dedicada a quienes no puedan tomar parte activa en las tareas del Congreso, con cotización reducida: 25 pesetas, en lugar de las 100 pesetas del «congresista activo».

Los «congresistas simpatizantes» también recibirán la insignia de congresista y toda la documentación del Congreso, incluidos los informes, conferencias y acuerdos del mismo.

Samideano

FERNANDO SOLER VALLS mortis

Nia kara amiko kaj fervora esperantisto, S-ro Fernando Soler Valls, mortis la 24-an de Marto, kion ni bedaŭras komuniki al niaj legantoj. Al lia amata familio ni sendas nian plej sinceran kondolencon. Sed li ne meritas nur ĉi tiun mallongan sciigon, kaj ni publikigos nekrologan artikolon en la venonta numero.

● «Bulteno Gepatra», la interesplena bulteno de la esperantistaj gepatroj, ankaŭ interesa por ĉiu esperantisto. Kotizo libera. Peranto por Hispanujo: S-ro Adonis González Meana, Ciaño Sta. Ana, Oviedo, Hispanujo.

● Koresponda Servo. Kiu deziras korespondi kun la tuta mondo, skribu al S-ro Adonis González Meana, Ciaño Santa Ana, Oviedo, Hispanujo, indikante aĝon, profesion, emojn, dezirojn. Bonvolu aldoni 3 pesetojn aŭ egalvalorajn poŝtmarkojn.

● Esperanta poŝtkarto eldonita de La Verda Kolombejo, Esperanto-Grupo, Ciaño Santa Ana, Oviedo, Hispanujo. Prezo: 10 ekzempleroj, 3 pesetoj aŭ 1 internacia rpk.

● S-ro Kiichiro Date ricevis aerleteron el La Felguera, sed la sendinto ne sciigis sian nomon. Bonvolu ree skribi klarigante tion, por ke S-ro Date povu respondi.

● La Bilbao Esperanto-Grupo, en Bilbao, Hispanujo, festos dum venonta Majo la 50-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Tiuokaze, oni aranĝas esperantan ekspozicion kaj oni petas al la ĉiulanda gesamideanaro alsendon de leteroj, poŝtkartoj filatele afankitaj kaj ĉiuspecaj esperantaĵoj. Ĉio estos danke akceptata.

● Cent diversaĝaj kaj diversprofesiaj gelernantoj organizas solenan letervesperon por la tria semajno de Aprilo. Ili atendas salutojn de eksterlandaj gesamideanoj. Skribu amase al kursestro: S-ro Kazimierz Strzelecki, Maly Rynek Nr. 11 m. 1, Opole, Pollando.

BOLETIN

de la

FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

BULTENO

DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio
Str. Pelayo, 7, 1.^a

VALENCIA

Kotizoj de la Federacio

Simpla membro: 15 pesetojn jare

Membro-abonanto: 50 pesetojn jare

Membro-subtenanto: 80 pesetojn jare

La membroj de la du lastaj kategorioj ricevas la Bultenon. La subtenantoj ricevas du ekzemplerojn. Eksterlanda abono al la Bulteno: 50 pesetojn jare

Monsendojn adresu al:

S-ro Ernesto Hurtado

Str. Pelayo, 7, 1.^a - VALENCIA

DONACOJ AL NIA BULTENO

Antaŭa sumo. 743 pesetoj

L. A. Ramírez, Vera	12	»
M. Solá, Tarrasa	40	»
A. García, Bilbao	15	»
M. Alamo, Valverde	13	»
F. García, Cádiz	10	»
J. Armadans, Moyá	10	»
Sabadellano	50	«
J. Devís, Valencia	10	»
A. Sánchez, Madrid	15	»
A. Pont, Valencia	25	»
M. Monleón, Bogotá	25	»
J. Herp, Barcelona	20	»
E. Lunate, Baracaldo	10	»
M. Garriga, Tarrasa	10	»
E. Capdevila, Barcelona	10	»
E. Larruy, Bilbao	10	»
V. Fernández, Barcelona	5	«
N. Ullar, San Felu Codinas	10	»
E. Wolff, Santa Cruz de Tenerife	25	»

Jenaj membroj de Casa Valencia,
de Barcelona:

A. Balta	5	»
R. Barrufet	10	»
F. Brú	5	»
J. Castro	5	»
R. Gisbert	10	»
J. Ivern	5	»
A. Janhué	5	»
J. Llinares	5	»
A. Miguel	5	»
A. Pasarisa	5	»

Entute, 1.128 pesetoj

Sinceran dankon al ĉiuj!